



Voĉdonilo

Estimata membro,

Ni kore invitas vin al nia Ĝenerala Asembleo okazonta en Sète,

dimanĉe la 24an de aprilo 2011, 14a-17a , salono Mediteraneo

1 – Legu en la ĉi-postaj paĝoj la agadraporton oktobro 2009 - septembro 2010

2 – Legu la finanĉan raporton laŭ la sama periodo

3 – Legu la sinprezenton de la 9 kandidatoj por renovigo de duono de la Komitato (8 postenoj).

Leginte la kandidatajn sinprezentojn, vi forstreku en la voĉdonilo kandidatiĝo(j)n aŭ ne, laŭ via deziro. Sciante, ke « Chaque membre délégué doit être élu par la majorité des suffrages exprimés (vote par correspondance) (...) » (Règlement intérieur 4.1.2.) Resendu la voĉdonilon en la kovertoj kiujn vi ricevis. Metu la voĉdonilon post kompletigo en la sensignan koverton kaj fermu ĝin. Poste, enmetu tiun en la alian, algluu poŝtmarkon kaj sendu ĝin al la sidejo de Esperanto-France, tiel ke ĝi alvenu plej malfrue jaŭdon la 21an de aprilo 2011 aŭ alportu ĝin al la akceptejo de la kongreso en Sète antaŭ la 20a horo sabate la 23an de aprilo.

Kandidatoj

Michèle Abada-Simon (1936). Kvankam mi estas pli kaj pli delonge juna (kiel ĉiuj vi !), kaj nun iĝas mallaborema, kun nek interreto nek memoro, tamen mi pretas denove rekandidatiĝi. Mi ne multe utilas. Sed precipe deziras subteni ĉiujn novajn ideojn, projektojn, iniciatojn, por klarigi al neesperantistoj intereson de Esperanto por Eŭropa Unio kaj la tuta planedo. Inter alie, mi ŝatus dispartigi miajn spertojn de "manifestacioj". Dum pli da tempo, ŝajnas al mi urĝe diskonigi raporton de F. Grin, kaj ties gravaj aspektoj mona, kaj samtempe pedagogia, demokrata, efika. Do, mi estas humile je via dispono, se mankas plej brilaj kandidatoj.

Jeanne-Marie Cash. Lernis esp. en 1962. Kapableco en 1964

Aktivis en TEJO (vicprezidantino 1971 - 1973) - Disvolvis *Pasportan Servon* ekde 1974 ĝis 1982. Loka aktivado en Tuluzo :

Kunkreis Esperanto-Kultur-Centron de Tuluzo en 1992 kaj estis en la estraro ĝis 2008.

UFE : Komitatano dum deko da jaroj. Redaktas *Esperanto Aktiv'*

Alia : Regule tradukas por *Le Monde diplomatique* en Esperanto ekde 2003.

Philippe Chavignon, (1958), loĝas en Guillaumes (06). Arbarteknikisto, abelbredisto, Eo-instruisto. Esperantistiĝis tra la mondo en 1984/85. UFE komitatano 1993-2005. 2007-2010 Komitatano C de UEA.

Kunlaboris/as kun UEA pri Afrika Agado kaj Latinameriko. Aktive partoprenas projektojn "Indiĝenaj Dialogoj /Indiĝenaj Popoloj". Starigas projektojn pri solidara ekoturismo, memnutrado, sunenergio, abelbredado en indiĝenaj medioj kunlabore kun esperantistaj kaj neesperantistaj organizaĵoj. Ankaŭ starigis stipendiojn por indiĝenaj junulinoj.

Franci-skale, iniciatis starigon de Interasocia Komisiono pri Kunlaboro kaj daŭre subtenos interasocian kunlaboron.

Raymonde Coquisart. Mi eklernis Esperanton en decembro 1972 kaj membriĝis al UFE en 1973.

Mi vizitis universalfajn kongresojn de 1974 al 1999 krom 2. Mi fariĝis estraranino de JEFO kaj de UFE kaj poste ĝia ĝenerala sekretario en la jaroj 90. Post paŭzo de kelkaj jaroj, mi decidis denove kandidatiĝi al la komitato de Esperanto France cele helpi, konsili, se necesas komuniki pri Esperanto al la ekstera publiko aŭ ĉie kie mia modesta helpo estos bezonata.

Aleks Kadar (1975), Parizo. Plenuminte diversajn rolojn en la asocio dum mia 6jara Komitataneco (2004-2010), mi nun ĉefe kunlaboras pri la projekto Petskribo « Esperanto en bakalaŭreon ». Mi deziras rekomitataniĝi kaj kandidatiĝi al la estraro, por labori pri interna komunikado, plifortigo de la rilatoj inter la Federacioj kaj por realigi kelkajn projektojn inter alie sukcesigi la Petskribon.

Christian Lavarenne (1956). Esp. (1972) 1985 ; loĝas apud Limoges. Nuntempa laboro : finredaktado de doktora tezo.

Kvalifikoj kaj agadoj : Magistro pri klasika literaturo, doktoro pri bharataj studoj, « Altaj Esperantaj Studoj »-diplomito, DEA

(Master) pri (E-)historio (2004). UEA-fakdelegito ekde 1989. ISK-ano (AIS). Trad. al kaj el Esperanto. Kuratoro de E-Biblioteko de Limoĝio kaj Okcitanio. Sesmonata stipendiita esploro ĉe Biblioteko Hector Hodler (BHH, UEA-Centra Oficejo, Roterdamo) (2007). Celas provi : valorigi, (ret)uzebligi la francajn E-bibliotekojn ; diskonigi Esperanton en novajn mediojn ; reenkonduki oficialajn E-kursojn en universitato(j)n.

Sébastien Montagne (1977), instruisto pri matematiko, loĝas en Nantes. De unu jaro aktivas en Espéranto-France kiel kasisto : ekplibonigis la kasistan kaj librotenan organizon per aŭtomatigo cele al klareco kaj efikeco. Ŝatus daŭrigi la laboron, plu antaŭenigante ĝin.

Gaston Riera. Bien que je ne sois pas un brillant espérantiste expérimenté, je prétendrais toutefois être reconnu comme un bon militant

ayant acquis un certain savoir-faire au cours des années, avec un handicap que je n'évoquerai pas ici.

Qui peut par exemple démontrer avoir conquis à ses convictions : son Député-Maire, l'élue au Conseil Général Serge Méry qui mentionne l'espéranto sur son blog et l'élue au Conseil Régional ? Ainsi que la vice-présidente de l'université Paris 13 où, faute de prétendant à ouvrir un cours en présentant un projet, cette unité de valeur n'a pu voir le jour ?

Axel Rousseau (1978). Mi lernis Esperanton antaŭ dek jaroj dank'al la instruado de Claude Longue-Épée. Mi prezidis JEFO-n dum du jaroj, tiam, mi eldonis komikson de *Gaston Lafuŝ'* kaj *La eta Spiruo*. Krom mia eldonada sperto, mi ankaŭ zorgas de pluraj jaroj pri la retaj kursoj de JEFO kaj ŝatus proponi miajn komputilistajn spertojn al UFE.

Bonvolu respondi la 3 demandojn, distranĉi ĉi-tiun parton, kaj sendi ĝin en la ĉi-kunaj kovertoj

- 1 - Mi aprobas la **agadraporton** de Espéranto-France 2009 - 2010 : jes - ne - sindeteno -
(nedevice : se NE, kial ?)
- 2 - Mi aprobas la **financan** raporton de Espéranto-France 2009 - 2010 : jes - ne - sindeteno -
(nedevice : se NE, kial ?)
- 3 - Renovigo de duono de la **komitato (8 postenoj)**. Mi nepre forstreku almenaŭ unu nomon aŭ pli :

Michèle Abada-Simon	Jeanne-Marie Cash	Philippe Chavignon
Raymonde Coquisart	Aleks Kadar	Christian Lavarenne
Sébastien Montagne	Gaston Riera	Axel Rousseau

Agadraporto de Espéranto-France

2009-2010

La tuta estraro kunredaktis kaj kunkompilis tiun raporton kaj varme dankas la gramatikajn kontrolistojn : Emmanuelle Richard kaj Aleks Kadar

Tutlandaj agadoj

1. Komisiono pri Eksteraj Rilatoj

La tria jaro de la opini-esploro ne produktis uzeblan rezulton pro manko da respondoj. Post dujara enketo, ni tamen povas aserti ke duono de Francoj jam aŭdis pri Esperanto, kaj forte subtenas la ideon de ponto-lingvo kondiĉe ke oni havu tempon klarigi pri kio temas.

Listo de gazetaraj komunikoj dum la periodo :

- 15a de decembro 2009 : pri la subteno de Google okaze de la centjariĝo de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto.
- 21a de februaro 2010 : okaze de la tago de gepatra lingvo de Unesko.
- 21a de majo 2010 : Espéranto-France organizas sian kongreson en Germanio !
- 15a de oktobro 2010 : *La Eta Princo* denove disponiblas.

Aliaj kontaktoj kaj agadoj :

- 26an de septembro 2009 Renkonto de sinjoro Marc Rousset, aŭtoro de la libro *Le nouvel axe Paris-Berlin-Moscou*. Decido pri kunlaboro por atingi « Esperanto ĉe la abituriento ».
- Kontakto kun Caroline Mondon en januaro 2010 kaj APICS (The association for operation management) en marto 2010, senrezulte ĝis nun.
- Kontaktoj daŭris kun Fondation Chirac, kie Esperanto trovis lokon en la TTT-ejo kaj ĉeesto en Parizo la 4an de novembro 2010 ĉe la muzeo pri praartoj.
- Ĉe universitata nivelo, partopreno eblis en kolokvo pri tradukado en Strasburgo. Artikolo aperis en la retejo de Espéranto-France por raporti pri la sperto kaj tiaj eblecoj konatigi Esperanton en universitatoj.

Cyrille Hurstel

2. États généraux de l'espéranto

La kunsido « États généraux de l'espéranto » okazis sabate 29an de majo 2010, laŭ iniciato de Jacques Vuyet (tiam nova Komitatano de UFE). Ili estis organizitaj dum pluraj semajnoj de 4-kapa teamo.

Tiu kunsido, malferma al ĉiuj, kolektis ĉirkaŭ 50 ĉeestantojn, plimulto estis esperantistoj, sed ankaŭ ĉeestis kelkaj esperanto-amikoj kaj scivolemuloj, en teatra salono de la Universitato Paris-Descartes en Montrouge, apud Parizo.

Estis okazo malkovri la aktivaĵojn kaj nuntempajn informojn pri la ĉefaj Esperanto-movadoj en Francio : Espéranto-France, SAT Amikaro, Eŭropo Demokratio Esperanto (EDE), la katolikoj (FKEA), la fervojistoj (FFEA).

Aleks Kadar

3. MIREGE

Laŭ la bilanco farita de la gejunuloj de MIREGE sabaton la 31an de oktobro 2009, MIREGE 2009 estis granda sukceso. Pri tiu renkontiĝo ili longtempe memoros. Mariana el Bulgario pretas organizi MIREGE 2010 per sama eŭropa subvencio se eblas.

23 gejunuloj el Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Rumanio, Ukrainio kaj iliaj akompanantoj partoprenis tiun internacian artan esperantistan renkontiĝon por gejunuloj. Bedaŭrinde lastmomente grupoj de Italio kaj Slovenio rezignis pri partopreno. Samsemajne, 65 junaj francaj muzikistoj ĉeestis kaj muzikumis en la muzika centro de Baugé, kiu gastigis MIREGE.

Ĉiun matenon André Demarque el Bruselo malkovrigis al la « Mirantoj » vivon de Vincent Van Gogh pere de ludoj, puzloj, anekdotoj, teatraĵoj. Karbonkrajonojn ili uzis laŭ konsiloj de André por kopii plurajn pentraĵojn de Van Gogh kaj ekspoziciis ilin por la loĝantaro de Baugé.

Fine de la mateno okazis kantado por ĉiuj. Pluraj grupoj kunportis tekstojn de popolaj kantoj por prepari internacian kantprogramon kiun ni prezentis la 30an de oktobro en la festa salono de Baugé. Ankaŭ la junaj muzikaj staĝanoj partoprenis tiun koncerton, ĉu por esperante kanti, ĉu por muzikinstrumente akompani nian esperantan koruseton. Do Eŭropa estonteco, civitaneco kaj identeco kune sursceniĝis.

Posttagmeze, post libera tempo, estis elekteblaj diversaj atelieroj : teatraĵoj, eksteraj ludoj, dancoj...

Ĉiuj renduevis fine de la posttagmezo por malkovri unu landon : tradiciojn, kuirreceptojn, iom pri la historio de la lando kaj fine dancojn.

4. Paĝmarkiloj

Un lot de 300 000 marque-pages a été fabriqué avec le soutien d'Espéranto-France (opération neutre financièrement y compris les frais d'envoi en province).

Un deuxième lot de 300 000 marque-pages a également été produit mais pour diverses raisons hors Espéranto-France.

Quantité diffusée à des bénévoles intéressés par sa distribution : environ 400 000.

La quantité effectivement distribuée au public est très nettement inférieure, car il y a une forte inertie avec des stocks intermédiaires chez les bénévoles et aussi chez certains relais (bibliothèque, libraires...). Bien que cela soit difficile à estimer, il est probable que la quantité effectivement parvenue entre les mains du public ne dépasse pas 100 000.

Didier Janot

5. Retejo

Fine de 2009, Emmanuelle Richard modernigis la tutan retejon de UFE per nova sistemo (SPIP) kiu ebligas al pluraj personoj ĝisdatigi la informojn pli facile. Tiel, la ĉefpaĝo <http://esperanto-france.org> estis regule ŝanĝita por prezenti la novajn agadojn de la asocio : kongreso, eldono *La Eta Princo*, amaskomunikilo, Esperanto Aktiv' (vidu malsupre), ktp.

Emmanuelle ankaŭ aldonis butonojn por konigi paĝojn per Facebook kaj Twitter.

Claude Nourmont tralegis la tutan retejon por forviŝi gramatikajn erarojn kaj malnovajn informojn.

Axel Rousseau

6. Esperanto Aktiv'

De februaro 2010, UFE kaj JEFO kune dissendis retleteron al ĉiuj membroj kaj personoj kiuj interesiĝas pri Esperanto (ĉefe personoj kiuj aliĝis al la interretaj kursoj de JEFO). Tiu letero, verkita en la franca lingvo, prezentas kulturajn aferojn, kalendaron, agadojn de lokaj asocioj kaj librojn.

Tiu reta letero anstataŭigas la paperan leteron *Okazas* ekde Aprilo 2011.

Pli ol 3 000 personoj ricevas la leteron kaj Nicolas Gaufllet zorgo aligis membrojn de UFE al tiu dissenda listo.

Vi povas legi la malnovajn leterojn tie : <http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv> kaj proponi al interesitaj personoj senpage aboni irante sur la saman retejon.

Axel Rousseau

7. Agenda 21

Kadre de la "Agenda 21", estis organizita prelego pri daŭripova evoluigo, okazinta en etika kafejo proksime al la pariza sidejo.

Ĝin gvidis Sylvain Hatesse, de la kompanio « Innov'actions » (www.innovactions.com). Sylvain klarigis kiel la daŭripova evoluigo povas esti kondukata laŭ la funkciado de asocio. Partoprenis membroj de pariza AMAP (Association pour le Maintien d'une Agriculture Paysanne), kutimemuloj de la kafejo, membroj de UFE kaj eĉ respondeculino de la ministerio, kiu subvenciis la "Agendan 21". Tiu okazaĵo ebligis samtempe sciigi pri daŭripova evoluigo kaj pri Esperanto.

Aperis sliparo disdonota al tutmondaj esperantistoj kaj entenonta slipojn pri diversaj temoj de la daŭripova evoluigo, kun informoj kaj konsiloj.

Bruno Flochon ekprilboris la karbonan bilancon de la asocio.

Regula aperigo de artikoloj pri la temo “daŭripova evoluigo” en la revuo *Le Monde de l'Espéranto*. Prezento de la “Agenda 21” de UFE okaze de Esperanto-kongresoj.

Gijom Harmide

8. Afrika Solidareco

En 2009-2010 UFE rikoltis entute 266,54 eŭrojn por Solidareco al Afriko.

En octobre 2010 UFE a envoyé du matériel didactique (manuels + CD et dictionnaires) à quatre Africains, actifs dans l'association d'espéranto de leur pays : François Hounsounou (Bénin), Hassan Ntahonsigaye (Burundi), Lukolama Lufimpu, (Rép. Démocratique du Congo), et Alexandrine Omba (Congo). Le tout pour une valeur d'environ 280 euros, soit la totalité des dons reçus à cette intention l'an dernier.

Serez-vous parmi les prochains donateurs ? En remplissant votre bulletin d'adhésion, pensez à cocher la case « Don pour l'espéranto en Afrique »

Jeanne-Marie Cash

9. Edukado.net

UFE sukcesis kolekti 4205 eŭrojn por la renovigo de la retejo edukado.net
Tiu retejo helpas al instruistoj interŝanĝi pedagogiajn materialojn por pli facile instrui Esperanton.

10. Ŝanĝo de banko

Fine de la jaro 2009, UFE ŝanĝis bankon al Crédit Coopératif - NEF, kiu spegulas etikecon de nia asocio.

11. MCE Grésillon

UFE aliĝis al la Komitato de la MCE de Grésillon kaj vigle subtenas la agadojn de tiu kulturdomo.

12. Agadraporto pri historia biblioteko

Enspezo = 0

Elspezo = 0

Vizitoj = 0

Retadreso : <http://arkivo.esperanto-france.org>

Post la restarigo de la biblioteko de la eksa Sidejo ĉe strato Chabrol, ni preskaŭ finis la enkatalogigon de la arkivoj, heredaĵo de Generalo Hyppolite Sebert. Entute ĉirkaŭ 4000 dokumentoj estas pritraktitaj ĝis nun.

Ni deziras flegi kontaktojn kun aliaj biblioteko-tenistoj kaj interesatoj por partopreni pli grandskalajn projektojn.

Indas ankaŭ havi kontaktojn kun parizregionaj bibliotek-ŝatantoj por ke la kelo plu havu loĝantojn kaj por ke la laboro jam farita ne perdiĝu.

Jean Lazert

13. Sidejo

Entute ni traktis 668 mendojn kaj nenombreblajn telefonalkvonojn kaj retmesaĝojn.

La sideja skipo konsistas el pluraj helpantoj : Jean-Louis Pouillet, Jean-Francois Mestelan, Liliane Bon, Hélène Le Bihan, Anne-Marie Chaney, Didier Janot.

Vizitas la sidejon multaj homoj ; eksterlandaj ĉirkaŭ dekkvin : Brazilio, Japanio, Argentino, Italio, Kanado, Kanado, Svislando,

Rusio, Usono, Meksikio... Ni havas vizitojn preskaŭ ĉiutage ; provincanoj, lokaj esperantistoj, kelkfoje neesperantistoj, kiuj ĝenerale volas aĉeti librojn, havi pli da informoj aŭ simple viziti la sidejon.
La sidejo estas malfermita lunde, marde, merkrede de la 9a ĝis la 18a horo. Ĵaŭdo estas rezervita por dosieroj traktendaj, sed ni ricevas liveradojn ankaŭ antaŭviditajn aŭ pasantajn vizitantojn.

Nia ĝenerala sento pri la sidejo kaj la sideja laboro : ni faras pli multe ol ni komunikas. Specifajn agadojn prizorgis ankaŭ la sideja skipo :

- Daŭras projekto de Arkivo (Reordigo de la biblioteko kaj arkivoj en la kelo. Organizantoj : Regis Fournier kaj Jean Lazert helpitaj de la konsiloj kaj de la antaŭa laboro de Pierre Royer
- Preskaŭ ĉiutage okazas kursoj.
- Babilrondo kaj konversacia rondo. Organizantoj : Sonia Amariglio kaj Jean Delhomme.

Nia ĉiutaga vivo inkluzivas ankaŭ : mastrumadi la lokon, fronti diversajn problemojn, pretigi dosierojn...

Ni bonvenigas ĉiujn esperantistojn kiuj venas al Parizo por turismumi aŭ viziti familianojn, amikojn nepre trapasi la sidejon (4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris, metrostacio Bastille) kie vi ĉiam trovos afablan akcepton far la helpantoj. Vi povos konsulti surloke librojn, revuojn, informilojn. Via Sidejo atendas vin !

Susanna Beglaryan

Komitato

Elektita en Kaiserlautern (majo 2010), kunvenis 4 fojojn : maje 2010, oktobre 2010, januare 2011, maje 2011.

Reprezentas la membrojn :

- Michèle Abada-Simon
- Guy Camy
- Philippe Chavignon
- Jacques Vuyet
- Emmanuel Debanne
- Bruno Flochon
- Nicolas Gauffillet
- Julia Hédoux
- Didier Janot
- Anne Jausions
- Jean Lazert
- Sébastien Montagne
- Claude Nourmont
- Axel Rousseau

Reprezentantoj de la asocioj (kontraktintaj) :

- Auvergne : Jean-Pierre Boulet
- Bretagne : Xavier Godivier
- Centre-Ouest : /
- France-Est : Cyrille Hurstel
- Île-de-France : William Dumoulin
- Languedoc-Roussillon : Véronique Bichon
- Midi-Pyrénées : Marion Quenut
- Nord : Xavier Dewidehem
- Poitou-Charentes : Marie-France Conde-Rey
- Provence : Monique Arnaud
- Rhône-Alpes : Mireille Besset
- Espéranto Jeunes (JEFO) : /
- FET : Frédéric Scibor
- FKEA : Marie-Thérèse Marin
- GEE : Michel Dechy

Estraro :

- Prezidanto: Xavier Dewidehem
- Vicprezidantino : Claude Nourmont
- Vicprezidanto pri eksteraj rilatoj : Cyrille Hurstel
- Kasisto: Sébastien Montagne
- Ĝenerala Sekretario : Axel Rousseau

3. Jarraporto de la membraj asocioj

3.1. Regionaj federacioj

3.1.1. Fédération Espéranto-Auvergne

Membraro

La membraro restas stabila : ĉirkaŭ 70 personoj (17 UFE-membroj).
Puy-de-Dôme : 40 (11 UFE), Allier : 25 (3), Haute Loire : 4 (2), Cantal : 1 (1 UFE).

Administrado

En la federacio funkcias 2 kluboj (Clermont-Ferrand kaj Moulins). Grupoj ekzistas en Montluçon (03), Vichy (03) kaj Mozac (63). La 3 lastaj grupoj funkcias interne de surlokaj kulturaj asocioj. Diversnivelaĵoj esperantokursoj estas organizitaj en la 5 centroj. Libroservo ne ekzistas en la Federacio kiu havas nur malgrandan stokon da libroj. La Ĝenerala Asembleo de la Federacio okazis la 13an de decembro 2009 en la sidejo de Esperanto-Clermont-Ferrand (ĉeestis 27 kaj 8 senkulpigis sin).

Informado

Ekspozicioj pri Esperanto estis prezentitaj okaze de asociaj forumoj en septembro 2010 en Mozac (63) Cournon (63), kaj Clermont-Ferrand (63). Pluraj artikoloj kun, fotoj, estis aperigitaj en la regiona ĵurnalo *La Montagne* okaze de vizito de la turneo de Hori YASUO kaj Arai TOSHINOBU (Japanoj) en januaro 2010. Aliaj artikoloj aperadis ankaŭ okaze de lokaj esperantistaj renkontiĝoj kaj partopreno al internaciaj kongresoj aŭ renkontiĝoj. Estis faritaj intervjuoj en radiostacioj : kun Hori Yasuo okaze de lia vizito (Radio Arverne) ; kun la prezidantino de Espéranto-Auvergne (Radio Scoop). Rimarkinda kaj efika estis la vizito de Hori YASUO en la reklam-kampo. Krom la ĵurnalaj artikoloj kaj la intervjuoj, la radio-stacio (Radio Arverne) proponis fari kurson de Esperanto : dum 4 sinsekvaj semajnoj estis elsenditaj duonhoraj lecionoj sekvataj de la 2-persona radio-teamo. En Moulins estis organizita unu semajna ekspozicio en la urba biblioteko okaze de la 75-jariĝo de la loka Esperanto-asocio.

Ekzameno

Dum la jaro 2009-2010 ne estis organizita ekzameno, sed ĝi estas en la programo 2011.

3.1.2. Fédération Espéranto-Bretagne

Nombre de personnes participant à des cours oraux de langue espéranto

Côtes-d'Armor : 65

Finistère : 22

Ille-et-Vilaine : 32

Morbihan : 61

Ces chiffres ne reflètent pas toute l'activité d'apprentissage de la langue espéranto en Bretagne, car il faut ajouter les cours par correspondance auprès d'organismes nationaux ainsi que les cours par internet sur des sites gratuits par des personnes qui n'adhèrent à aucune association.

La fédération regroupe 22 groupes locaux, dont certains sont eux-mêmes regroupés au sein d'associations départementales, dans les villes suivantes :

Côtes-d'Armor : St Briec, St Quay-Perros, Plestin-les-Grèves, Lannion, Trédez-Locquemeau, Guingamp, Dinan et Plélan-le-Petit, regroupés dans l'association « Espéranto-22 » ; Plouézec
Finistère : Quimper, Landerneau, Morlaix, Carhaix
Ille-et-Vilaine : Rennes, St Malo, Montfort-sur-Meu, Chartres-de-Bretagne
Morbihan : Vannes, Lauzach, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient

En 2010, un nouveau cours a été ouvert à Lorient.

Montant de la cotisation 2010 : adhérent à une association locale : 7 € par personne, 11 € pour un couple. Membres individuels habitant hors Bretagne : 11 €, en Bretagne 20 € (pour inciter les adhérents à s'inscrire par l'intermédiaire d'une association locale). Scolaires, étudiants, chômeurs : 3,5 €

Actions de la Fédération

- Édition du Bulletin de liaison et d'information Espéranto-Bretagne *La Verda Triskelo* (« le triskell vert ») 2 fois / an et d'un bulletin international une fois par an, jusqu'ici commun à notre fédération et à celle de Saxe. Cette année, première édition de *La Verda Triangulo* commun à trois fédérations.
- Fédération Bretagne : le responsable est Bert Schumann
- Fédération de la Région Saxe (Allemagne) : les responsables sont Benoît Philippe et Steffen Eitner
- Fédération de la Région Silésie (Pologne) : la responsable est Teresa Pomorska
- Organisation de tournées de conférences d'étrangers espérantophones :
 - Du 14 mars au 8 avril 2010, l'Italienne Paola Giommoni est intervenue auprès de 14 clubs de Bretagne et de Loire-Atlantique.
 - Du 17 mai au 21 juin, 14 clubs ont accueilli les Chinois Monsieur Peng Zhengming et son épouse Madame Zhang Li
- Jumelages
Participation à trois événements dans le cadre du jumelage Rennes-Jinan
- Édition
Réédition du livre *Anecdotes sur Confucius* trilingue : français, chinois, espéranto.
- Le Chœur Régional MEVEN
La chorale MEVEN a présenté avec Interkant le *Canto General* en espéranto dans les villes.

Actions de solidarité

La FEB ne relâche pas ses efforts en faveur de Bona Espero, centre d'enfants situé au Brésil.

Divers :

La FEB joue son rôle de conseil auprès des clubs, participe à la coordination des actions régionales, et recherche des partenaires et des correspondants étrangers.

Gestion du site internet <http://esperanto.bretonio.free.fr/> de la Fédération par Bert Schumann, bénévole de l'association rennaise affiliée, et modération de la liste de discussion de nos membres <http://fr.groups.yahoo.com/group/bretonio> par quatre bénévoles. Organisation de l'assemblée générale, qui a lieu chaque année à Loudéac.

Actions de nos associations adhérentes

Elles sont chargées de la diffusion de la langue espéranto et pour ce faire organisent des cours, stages, examens, rencontres avec des étrangers espérantophones, correspondances collectives, participent à des opérations de jumelage, à des forums de langues, des forums d'associations et diverses manifestations.

Elles réunissent aussi leurs membres autour d'activités en espéranto dans des domaines divers : jeux de rôle, théâtre, chant choral, randonnée, informatique etc.

En plus de ces actions traditionnelles, certaines réunissent leurs membres autour d'activités remarquables.

- Nombreuses correspondances des élèves bretons avec des élèves du monde entier, notamment des villes jumelées (ex. Kronach-Hennebont, Yantai-Quimper, Rennes-Brno- Erlangen- Jinan) ;
- Participations à de nombreux forums d'associations, foires, festivals, salons du livre, des solidarités, bio, ... ;
- Expositions diverses.

3.1.3. Fédération Espéranto-Centre-Ouest

(Jarraporto ne ricevita)

3.1.4. Fédération Espéranto-France-Est

La estraro/komitato de EFE realigis dum la pasinta agadjaro la jenajn erojn :

- Monsubteno okaze de vizito de Probal Dasgupta al Strasburgo kaj Mulhouse.
- Serĉado kaj vizitado de eblaj staĝejoj en la proksimeco de FRAIZE por la venonta printempa staĝo en la departemento Vosges.

- Preparado de la staĝo en LE VIC kun la respondeculinoj Simone CAJELOT kaj Ginette MARTIN.
- Funkciado de Libro-servo okaze de staĝoj kaj perkoresponde fare de Jean-Luc THIBIAS.
- Enretigo de la katalogo de la LIBROSERVO de EFE fare de Jean-Luc THIBIAS kaj André GROSSMANN.
- Daŭra funkciigo de PKK (perkoresponda kurso) fare de Edmond LUDWIG. Tri aliĝantoj en 2010.
- Surpaneligo de la 12-panela ekspozicio pri Esperanto fare de Edmond LUDWIG, dank'al senpaga disponigo de paneloj fare de Michel BASSO. Pri la kalendaro por rezervado de la ekspozicio respondecas Jacques HERLÉ.
- Daŭra ĝisdatigo de la ret-paĝoj <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr> fare de André GROSSMANN.
- Portempa venko post denovaj klopodoj : Commission Paritaire des Publications et Agences de Presse konsentas pri pluigo de favoraj tarifoj por la dissendado de LA INFORMILO dum 4 jaroj.
- Regula interkontaktado de la komitatoj pere de la dissendolisto « Nia komitato »
- Informado al dissendo-listo Alzaco-Loreno: <http://fr.groups.yahoo.com/group/Alzaco-Loreno/>
- Ĉefredaktado kaj ĉefpretigo de LA INFORMILO daŭre prizorgata de Pol DENIS.

Logaj grupoj : Groupe Espéranto-Meuse ; TAKE (Colmar) ; Esperanto-Grupo de Gérardmer ; Mulhouse-Espéranto ; Espéranto-Nancy ; Grupo de Sarreguemines ; Strasbourg-Espéranto ; Espéranto-Thionville.

3.1.5. Fédération Espéranto-Île-de-France

Ĝenerala membro kunveno : okazis la 5-a de aprilo 2010 en la sidejo de Esperanto France.

En septembro 2009 : Fête de l'Huma. La fédération Espérantiste du travail (FET) provizis budon. La gejunuloj de JEFO prizorgis la aferon kaj esperantistoj de nia federacio helpis ilin.

Kursoj : tri nivelaj kursoj (1-a, 2a kaj 3a gradoj).

Trimonata kunveno de la komitato de la Federacio.

Babilrondo por progresantoj, gvidas Sonia Amariglio

La federacio ankaŭ zorgis pri la semajnfinaj staĝoj

La bulteno Flash daŭre ne estis eldonita.

Helpo ĉe la sidejo de Esperanto France : pluraj bonvolemluloj de la federacio helpas pri diversaj taskoj.

Sabatoj de la federacio regule okazis en la sidejo kun granda nombro de partoprenantoj.

3.1.6. Fédération Espéranto-Languedoc-Roussillon

(Jarraporto ne ricevita)

3.1.7. Fédération Espéranto-Midi-Pyrénées

Regiona kunordigado

La membraro malkreskis de 100 ĝis 96 (22 el CEEA, 63 el EKC, kaj 16 individuaj membroj de UFE, sed 5 estas en du listoj).

Notindas, ke kreiĝis nova asocio, Espéranto 65, en Hautes-Pyrénées, kies Ĝenerala Jarkunveno okazis en Trébons la 1an de oktobro 2010, sed ĝi ne aliĝis al nia regiona asocio (preferas kunlabori kun Pau, pli proksima).

Nia jarkunsido okazis dimanĉon 20an de decembro 2009, okaze de la Zamenhof-festo. Partoprenis 6 personoj (3 senkulpiĝis), el 3 departementoj. Kelkaj partoprenis la francgermanan kongreson en Kaiserslautern, kaj kelkaj la SAT-amikaran kongreson okazintan en Hillion (Bretonio).

La asocio estis reprezentata dum ĉiuj (tri) **UFE-komitatkunvenoj** de sia prezidanto Marion.

Informado kaj komunikado

Nia asocio havas **informbultenon** kaj **retejon**. Aperis du numeroj (januaro kaj septembro) de la *Cirkulero de Midi-Pyrénées*, interna bulteno, sendita ĉefe rete, sed ankaŭ perpoŝte al tiuj sen retadreso. La retejo funkcias nun kiel paĝo de la retejo de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo. Danke al Vincent, kiu respondecas pri ĝi, la ĝisdatigo estas nun taŭga.

<http://esperanto.toulouse.free.fr/>, klaku al « Esperanto en Midi-Pyrénées »

Nia asocio pruntis La Ekspozicion de 12 paneloj « Diversité des Langues et Espéranto » al lokaj kluboj en Toulouse, Tarbes kaj Aveyron.

Notindas, ke la lokaj asocioj prizorgas la informadon per **standoj en diversaj manifestacioj**:

- Forumoj de Lingvoj kaj de asocioj (deko en Tuluzo, kelkaj en Ariège, 2 en Aveyron, 1 en Tarbes- Hautes-Pyrénées)
- Deko da libro-foiroj en Aveyron.

Tiu departemento ankaŭ distingiĝis per du **originalaj eventoj** : en Najac, okaze de Libro-foiro, estis ceremonio pri transdono de **Diplomo kun stelo** al la urbestro la 1-an de aŭgusto; en Naucelle, oni **laŭtlegis poemon** en Esperanto, dum inaŭguro de monumento honore al loka okcitana poeto. La traduko en Esperanto estis ĉizita en ŝtono surplace, kiel aliaj tradukoj.

- Lernejoj (en Ariège kaj en Aveyron) kaj Universitato (Toulouse).

Radioelsendoj pri Esperanto okazas regule en Tuluzo, Villeneuve d'Aveyron kaj Foix. Tiuj de Tuluzo kaj Foix povas esti interrete aŭskultataj, tiuj de Villeneuve podkaste.

Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj regule okazas iniciate de lokaj grupoj : Tuluzo (du niveloj) kaj St Orens, Aveyron (unu nivelo), Ariège (Mirepoix, Laroque d'Olme, Foix, Verniolle), Tarn et Garonne : Lavaur, Albi (2 niveloj). 1 kurso en Hautes-Pyrénées.

Tri **semajnfinaj kursoj** okazis sukcese en Arrout (Ariège), organizitaj de EKC.

Ĉi-jare la asocio ne organizis **ekzamenojn**.

Pedagogian seminarion organizis la tuluza asocio kun financa subteno de nia asocio kaj tiu de la Fervojista Grupo, la 10-11ajn de aprilo, kadre de la seminarioj Flugiloj de Malfacila Vento de ILEI. Estis 15 partoprenantoj. Sekva seminario estas planata en nov. 2010.

Kulturo kaj aranĝoj

Festoj :

La tradicia Zamenhoffesto kunvenigis kvardekon da esperantistoj el la regiono en Tuluzo, por festmanĝo kaj **koncerto de FAMO**. Ĝi estis interesacia aranĝo (ankaŭ kun la Fervojistoj).

La **Cercle d'Etudes Espérantistes de l'Ariège** (CEEa) festis en aprilo 2010 sian 40-an datrevenon en Verniolle, la urbo de sia kreinto s-ro Raymond Pons, per koncertoj kaj balo, kun jOmO.

Nia regiono profitis el **FESTO, internacia junulara festivalo**, organizita de JEFO kaj Vinilkosmo, kun helpo de EKC-Tuluzo. Ĝi okazis aŭguste en Donneville, sur la loko mem de Vinilkosmo-eldonejo, je 20 kilometroj de Tuluzo. Pluraj publikaj koncertoj atentigis la ĝeneralan publikon pri ekzisto de Esperanto.

Prelegoj de eksterlandanoj:

Akcepto de la **japanoj** Hori Jasue kaj Arai Toshinobu en Villeneuve d'Aveyron.

Du **kubanoj**, Yoandra kaj Norberto, prelegis la 14-an de oktobro 2009 en Toulouse.

La **Tuluza Teatro Trupo** (TTT) post tre aktiva sezono en 2008/2009, dormetis ĉi-jare, sed planas reaktivi baldaŭ (prezentiĝos dum la Zamfesto la 12-an de dec. 2010).

Koncertoj de Interkant', interregiona kaj internacia koruso

De septembro 2009, 12 kantemuloj el la tri regionoj (Langvedoko, Midi-Pyrénées kaj Akvitanio) aliĝis al Interkant', kaj preparis en Tuluzo, sub gvido de Jacques Caubel kaj la ĥorestrino Franjo Lévêque, la prezenton de la Kanto Ĝenerala, esperantlingva adapto de la fama poemo de Pablo Neruda kun muziko de Theodorakis. En 2010 la korusanoj partoprenis en koncertoj en Hillion (Bretonio), Kaiserslautern (Germanio), Le Mans, kaj Havano (Kubo). Planataj koncertoj en 2011 : Tuluzo la 6-an de marto, Parizo (majo) kaj Sarajevo (en julio, SAT-kongreso).

Produktado de aŭddiskoj : Post *Nouveau Cours d'esperanto* kunproduktita kun UFE, ni kunproduktis la KD-on de *Junulkurso*, kun SAT-amikaro.

3.1.8. Fédération Espéranto-Nord

Regiona kunordigado

Membraro (klubo, individuoj) kaj evoluo:

Araso: 24

Bulonjo-ce-mar: 4

Dunkirko: 20

Lille-Villeneuve-Espéranto: 31

Valencieno: 20

Izoluloj: 15

Entute nia federacio nombras 114 membrojn. En 2009 ĝi nombris 119 membrojn.

Federaciaj kunsidoj, kongresoj:

Nia federacio kunsidis kvarfoje en 2010, la 13an de marto, la 25an de aprilo, la 12an de junio, kaj la 9an de oktobro.

Kongreso okazis la 25an de aprilo en Oresmaux kun ĝenerala asembleo, renovigo de la komitato, komitatkunsido (Arlette Plutniak estis elektita prezidantino), kaj diversaj turismaj eblecoj.

Rilato kun UFE:

Pluraj federaciaj membroj en la diversaj instancoj de UFE.

Informado kaj komunikado

Federacia gazeto, federacia retejo:

Nia federacia gazeto, la *Norda Gazeto*, aperis trijfoje, kaj nia dulingva federacia retejo konsulteblas :

<http://esperanto.nord.online.fr/fr/index.htm>

Informado en diversaj medioj (foiroj, lernejoj, ktp.):

Niaj diversaj kluboj partoprenis en Forumoj pri Asocioj (Araso, Villeneuve d'Asq...), en Festivaloj pri lingvoj (Lille, Dunkirko) kaj aliaj kulturaj aranĝoj (12-a Poeta Printempo en Dunkirko, « Salon du livre d'expression populaire et de critique sociale » en Araso, Esperanto-stando en la arasa urbodomo kadre de la Eŭropa Tago). Lille-Villeneuve-Espéranto partoprenis en la prikultura semajno de la kolegio Molière.

Michel Dechy, prezidanto de Lille-Villeneuve-Espéranto, verkis libron, *La Bildstrioj kiel lernolibroj*, kaj jam plurfoje uzis ĝin dum esperantaj renkontiĝoj (Plouezec...)

Partopreno en landskalaj kampanjoj : Claude Longue-Épée aktive agadas por refortigi la petskribon por enigi Esperanton en la abituriantan ekzamenon.

Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj, staĝoj, nombroj da lernintoj:

Ses kursoj estis organizitaj de niaj kluboj dum la lerneja jaro 2009-2010 :

- **En Dunkirko** : 3-4 lernantoj. La kurso okazas merkrede ĉiun duan semajnon.
- **En Valencieno** : 5 lernantoj inter kiuj ne estas komencantoj.
- **En Araso** : 7 komencantoj, 12-13 praktikantoj.
- **En Villeneuve-d'Asq** : 6 komencantoj kaj 8 lernantoj je la dua nivelo.
- **En Bersée** : 4-5 lernantoj inter kiuj estas 1 komencanto ; 1 kolegiانو.
- **En Oignies** : 1 komencanto kaj 4-5 je la dua nivelo.
- **En Lille** : nova kurso kun du komencantoj komenciĝis en septembro 2010

Somera staĝo estis organizita de Lille-Villeneuve-Espéranto, julie kaj aŭguste, kun 5 komencantoj.

Nia federacio organizas ĉiujare Eŭropan Rendevuon, kaj en 2010, la 22a rendevuo unuafoje okazis en Stella-Plage kaj estis granda sukceso dank'al la entuziasmoplenaj organizantoj, nia federacia prezidantino, Arlette Plutniak, kaj ŝia edzo Edmond. Partoprenis 145 homoj el 22 landoj.

La laborgrupojn gvidis famaj esperantistoj : Katalin KOVATS por la grupo de la komencantoj, observataj de esperanto-instruistoj, Sylvain LELARGE por la progresantoj (paroliga kurso), Renée TRIOLLE kiu gvidis paroligan kurson kun temo *La rusa kulturo*, Anne JAUSIONS pri la franca triagrada ekzameno, kaj Kristin TYTGAT pri la eŭropaj referenckadraj ekzamenoj. Vespera koncerto de la nederlanda grupo Kajto kaj turismaj vizitoj kompletigis tiun densan semajnfino.

Federaciaj ekzamensesioj, nombro da ekzamenitoj :

Nia federacio organizis trinivelan ekzamensesion la 20an de junio 2010 en Lille kun jenaj rezultoj :

- Unuagrada ekzameno : sukcesis 9 el 10
- Duagrada ekzameno : sukcesis 1 el 4
- Triagrada ekzameno : sukcesis 3 el 3

Pluraj federacioj (minimume 4) jam sukcese trapasis la C1-ekzamenon de la Eŭropa Referenckadro, kaj pluraj aliaj intencas tion fari en 2011.

Nia prezidantino, Arlette Plutniak, kaj ŝia edzo Edmond partoprenis universitatan studsemajnon pri didaktiko en Pollando (Poznan). Ili daŭrigos tiun studadon dum 2011.

Kulturo kaj aranĝoj

Michel Dechy plurfoje prelegis (Rotary-klubo de Lesquin kun Jacky Ramon, prezidanto de la Arasa klubo, Valenciennes...).

Januare, HORI Jasuo, japana esperantisto, estrarano de UEA, kaj lia amiko ARAI Toshinobu prelegis en kolegioj de Villeneuve-d'Asq kaj ankaŭ por la esperantistoj. Aperis artikoloj en *La Voix du Nord* kaj en *Nord Éclair*.

La 11an de septembro multaj federacioj ĉeestis la prelegon de Maurice kaj Christiane FOUCHER, geesperantistoj el Nantes pri la tanzania asocio Mazingira en la urbodomo de Fouquières-lez-Lens :

<http://www.kono.be/mazingira/fr.html>

En 2010 okazis pluraj ĝemelklubaj renkontiĝoj : Valenciennes-Espéranto renkontis la klubon de Solre-sur-Sambre, Lille-Villeneuve-Espéranto renkontis la klubon de Kortrejko.

La 15an de decembro la dunkirka klubo organizis Zamenhofan Feston en restoracio, kaj Lille-Villeneuve-Espéranto unuan fojon okazigis feston kun ĉeesto de pli ol 40 gesamideanoj.

Partopreno en kongresoj aŭ aranĝoj landaj, eŭropaj aŭ mondaj :

Pluraj federaciaj partoprenis en la Interasocia Renkontiĝo ĉe Mediteraneo, en PSI (Printempa Semajno Internacia) en Germanio, en la kongreso de UFE en Kaiserlaŭtern, en la Beneluksa kongreso en Antverpeno, en la Havana kongreso en Kubo, en la Itala kongreso en aŭgusto, en Arkones en Pollando, kaj en Nördlingen en Germanio okaze de IF.

Perspektivoj

Nia 2011 federacia kongreso okazos la 3an de aprilo en Amieno. Ni esperas ke venos pli da federaciaj ol lastjare kaj ke tiu kongreso plifortigos la ligojn inter niaj kluboj kaj ankaŭ inter ni kiel individuoj. Post la 2010 sukceso, la venonta eŭropa renkontiĝo kiu denove okazos en Stella-Plage estas jam preparata. Ni plej verŝajne organizos ankaŭ Zamenhofan feston.

Katja Boen

3.1.9. Fédération Espéranto-Poitou-Charentes

(Jarraporto ne ricevita)

3.1.10. Fédération Espéranto-Provence

Membraro :

La Esperanto-Provence Federacio havis 305 membrojn je la 31-a/12/2009.

13 grupoj en la jenaj departementoj kaj urboj :

04 Manosque kaj Villeneuve ; 05 Gap ; 06 Nice, Cannes ; 13 Aix en Provence, la Ciotat, La Roque d'Anthéron, Miramas ; 83 Fréjus - St Raphaël, Toulon ; 84 Avignon, Carpentras.

Administro :

Membrokunveno okazis en Manosko la 9-an de majo 2010, la antaŭan sabaton, la 8-an okazis prelego far Patrick Lagrange : « Kopenhago 2009 », Prelego pri Rusio kun Renée Triolle, kurso kun Christine Grayssaguel.

Elektio de Komitatanoj : Sinprezentas novaj kandidatoj, ili estas elektitaj !

Jen la Komitatanoj por 2010 :

Gonzales Isabelle; Spanjaart Thierry ; Wallez Nicole ; Arnaud Monique ; Oliva Pierre ; Prezioso Monique ; Triolle Renée ; Cerisay Michel ; Wallez Gilles ; Demongeot Claudie ; Mimmersheim Franz.

Jen la estraro :

Prezidanto : Pierre Oliva

Vic-prezidantino : Monique Prezioso

Sekretariino : Monique Arnaud

Help-Sekretariino : Claudie Demongeot

Kasisto : Michel Cerisay

Respondeculoj pri bulteno : Pierre Oliva / Renée Triolle

Rilatoj kun Esperanto France : Monique Arnaud / Gilles Wallez.

Komunikado kaj Informado :

La federacio daŭre eldonas sian ĉiutrimonatan bultenon *Esperanto-Provence*.

Unu klubo eldonas propran bultenon.

La diversaj kluboj partoprenis en multaj neesperantistaj aranĝoj : forumoj de la asocioj – Manosque, la Ciotat, Aix en Provence, ekspozicioj – Manosque, Gap, la Ciotat, ST Raphaël.

Tago de la gepatra lingvo en la Ciotat, en partnereco kun asocio « Le Grand Portique » kaj en St-Bonnet en lernejo.

Renée klarigas kiel ŝi ĉiam provis enŝovigi Esperanton :

La Ciotat « Cœur de Parc »
Festivalo de la Dividita Poezio
Tago de la Patrino Lingvo
« Fête des Places ... »

En Manosque la grupo ĉiam provas rilati kun lokaj gazetoj, diversaj lernejoj inter ili la Internacia Lernejo – en Manosko kaj Ste-Tulle, kun la Centro de Cadarache, la respondeculoj de Junuldomo kaj de mediateko kaj vizitas la trinkejon « Café Polyglotte ».

– ĉe Radio-Mistral elsendis Jose Grammatico kaj Patrick Lagrange.

Prezentado de la lingvo kun ekspozicio en CEA-CADARACHE de la 22-a ĝis la 26-a de novembro 2010 .

Kadre de la Jaro de Alproksimiĝo de Kulturo, Esperanto-la Ciotat prezentis ĉe ClipArt, avenue Dulac ekspozicion ĝis la 30a de aprilo. Eblis vidi teksaĵon el Kongo, arbon el papero, kies folioj estis desegnitaj de brazilaj infanoj, pentraĵojn laŭ diversaj teknikoj el Rusio, Kroatio, Ukrainio, Japanio, Barato plus ekspozicion de JEFO pri Esperanto!

Okaze de la Internacia Tago de la Patrino Lingvo, la 21an de februaro, Esperanto-la Ciotat kunigis en le Grand Portique lingvo-amantojn, kaj unuafoje aperis Rusino, dum eblis kompari la anglan parolatan de Britino kaj tiun parolatan de Usonano. Ankaŭ aŭdiĝis la portugala (el Portugalio, Brazilo kaj Mozambiko), la sicilia, la itala kaj la malta!

Tago de la Virino : Renée Triolle estis petita prelegi pri virinoj en Rusio, do ekster Esperanto sed estis budo en La Ciotat.

Okaze de la Forumo de la asocioj : en septembro Renée kaj Thierry starigis budon, la 11-an en La Ciotat, la 12-an en Marsejlo, Parko Borely...

Samtempe en Embrun okaze de foiro, la klubo de Gap starigis budon kaj ĉe la Verduloj en Aubagne.

Instruado kaj ekzamenoj :

La diversaj kluboj organizis regulajn dumjarajn kursojn kaj komencantajn staĝojn en klubejoj, lernejoj.

Kursoj: Intensiva staĝo en Le Castellet (83) la 23an kaj 24an de januaro. Malgraŭ la malvarmo, kelkaj kuraĝuloj aliĝis al tiu 10hora staĝo, kiu komprenigas, kiel funkcias la lingvo, al kio ĝi utilas, kiel uzi ĝin. La partoprenantoj akiras nivelon A1 de la eŭropa Referenckadro kaj povas mem daŭrigi la studadon.

Kaj same en La Ciotat (13) : La Intensivan staĝon la 2an kaj 3an de oktobro vizitis homoj el Hyères (83) kaj Gap (05).

Natura leciono : kadre de Freinet-Movado, MarieHo el Ceyreste (13) gvidis provlecionon antaŭ siaj gekolegoj de Bouches-du-Rhône, elektante humuran frazon en Esperanto (lingvo nekonata de la ĉeestanta instruistaro) por klarigi, kiel instrui « nature ».

Konversacia staĝo okazis la 20an de marto en Manosque por plibonigi la parolkapablon de la organizantoj de nia printempa rendevuo. Kurso pri tradukado estis proponita la 13an de marto de « Réinsertion et Esperanto ». Se radikoj similas en Esperanto kaj en franca lingvo, la dirmaniero komplete malsimilas, kaj tio kreas problemojn dum tradukado.

La klubo Fréjus-St Raphaël organizis M.E.S., unu semajnan staĝon ĉe marborbo en Agay, partoprenis multaj eksterlandanoj. Nun en Aix estas Literatura Kafejo. Ekzamensesio okazis en Marsejlo – una kaj dua grado.

Kiel kutime la kultura semajnfino de La Ciotat okazis en novembro 2010.

Krom la kutimaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj okazis tute nova prezentado por la Trianivela : tradicie tiu kurso sin turnas al bonaj praktikantoj. Unuafoje ĝi okazis... en la franca! Estis invitita Cyrille Hurstel, vic-prezidanto de Espéranto-France pri Eksteraj Rilatoj. La komuna laboro estis lerni kiel rilati kun ĵurnalistoj, redakti invitolon al gazetarkonferenco, redakti informon pri aranĝo.

Laborante en pli malgrandaj grupoj, la lokaj respondeculoj multe lernis kion fari sed ĉefe NE fari; kiujn esprimojn eviti aŭ substreki ktp. Dimanĉe matene Cyrille traktis dulingvismon ĉe infanoj aŭ kiel instrui aŭ praktiki Esperanton en familio. Multaj materialoj (filmoj, tradukitaj el televid-programoj, libretoj, ktp) estis montritaj. Ni ne forgesu, ke la nunaj infanoj kutimas je koloroj, sonoj, movoj, kaj ne kontentiĝas pri nigre-blanka libro eĉ se la teksto estas en perfekta lingvo.

La Komitato de Esperanto-Provence decidis pagis la kostojn por la membroj de la federacio por stimuli aŭ kuraĝigi la lernantojn trapasi la ekzamenojn de FEI.

Kulturo kaj aranĝoj :

Kiel enŝovi Esperanton, kiam evento rilatas al lingvo? Ekzemple, kadre de Festivalo de Dividita Poezio, en La Ciotat, poeziaĵoj de Marjorie Boulton surprizis kaj entuziasmigis la aŭskultantojn, kiuj miris pri la belsoneco de la lingvo kaj malkovris, ke ekzistas poezio en la internacia lingvo.

En St Raphaël Carmen kaj la familio Prezioso bone laboras kun « Handisport ».

Festo okazis la 23an de majo kun bona partopreno de Marité. en La Roque d'Anthéron okazis la Festo de la ĉerizoj la 30an de majo, Fête du CIQ-Fontaine en La Ciotat, en Ste-Tulle la 26-an de junio : Festo de la solidareco, en Gap la 27-an de junio : Festo de la Pacmovado en agrabla parko de Charance.

Marseille (13) : Ĉino ZHENG el Pekino vizitis la kurson.

Multaj federaciaj partoprenis esperantaj kongresojn aŭ renkontiĝojn (francajn kaj eksterlandanajn) kaj staĝojn.

S-ro Miyoshi planis turnei tra Francio kun sia sekretario. Pro sanaj problemoj li devis reiri al Japanio. Lia sekretario, Atilio, legis lian prelegon.

Prelegoj okazis en Avinjono, marde la 23an kaj en Marsejlo la 24an de novembro. Post la prelego, okazis amika manĝo kun la esperantistoj.

Venontaj Projektoj :

M.E.S. (Mediterranea Esperanto Semajno) okazos en Agay de la 26-a de februaro ĝis la 5-a de marto 2011.

Marsejlo estos Urbo de kulturo en 2013. Ni devas traduki multajn artikolojn en Vikipedio.

Renée partoprenis preparkunvenon pri partopreno de La Ciotat en la eŭropa evento « Marseille 2013 » kun demando pri la lingvo-politiko de la organizantoj (ĉu uzi nur la anglan apud la franca, kaj tiel kontraŭstari la leĝon Toubon de 2004 pri uzo de fremdaj lingvoj), kaj propono pri esperantigo de la TTT-ejo kaj aranĝo de kolokvo pri « Lingvoj kaj kulturoj de la Mediteraneo ».

3.1.11. Fédération Espéranto-Rhône-Alpes

Fonctionnement de la Fédération

Le Conseil d'administration s'est réuni 2 fois depuis la dernière AG :

- 05/12/2010 à Lyon 7e, 302 rue Garibaldi
- 29/01/2011 à Lyon 1er, place des Terreaux

Outre les nombreux contacts le bureau s'est réuni le 9 avril 2011 à Fontaine.

Les réunions de conseil d'administration permettent une information et une discussion autour des activités de associations membres et autour de la vie du mouvement espérantiste.

Les sujets abordés ont concerné :

- pour une bonne part notre organisation interne que nécessite notre éparpillement sur un territoire étendu ;
- les examens KER en mettant en lumière les avantages du système et surtout la reconnaissance à l'extérieur du mouvement, mais aussi les réticences face à la concurrence des examens nationaux ;
- le bilan du congrès de Saint-Étienne 2010 ;
- la préparation du congrès de Fontaine 2011 ;
- la mission de formation de la fédération ;
- la mise au point de l'édition d'un timbre postal ;
- la proposition d'édition d'une mallette de jeux en espéranto ;
- les relations avec Espéranto-France ou d'autres mouvements espérantistes ou en lien avec l'espéranto.

Le congrès de Saint-Étienne

70 personnes ont participé au congrès qui s'est déroulé les 29 et 30 mai 2010, sur deux journées pleines samedi et dimanche. Il s'est tenu à l'amicale Tardy, dans un quartier périphérique de la ville, ce qui n'a pas facilité la visibilité pour le grand public. L'association de Saint-Etienne avait pourtant fait beaucoup de publicité pour attirer le public à la conférence de Cherpillod et au concert de jOmO.

Tout le congrès s'est déroulé au sein de cette structure : accueil, libroservo, salles, salle de spectacle et repas.

Les ateliers du samedi et dimanche matin ont été : initiation à l'espéranto, conversation, atelier du rire, visite du musée de la mine, un atelier sarbacane.

Plusieurs conférences ont été proposées :

- André Cherpillod a tenu une conférence en français sur « L'espéranto pour préserver nos cultures ». À cette occasion il a

présenté le rapport de François Grin.

- Edmond Ludwig, enseignant à l'université de Haute-Alsace, a présenté en espéranto les méthodes pédagogiques pour enseigner l'espéranto.

- André-Jacques Holbecq a animé un débat en langue française sur l'économie sociale.

Samedi soir jOmO nous a présenté un concert très gai et très vivant, largement apprécié par les congressistes malgré la quasi absence de public extérieur.

Un petit point relevé par beaucoup de participants est le manque d'encadrement dans ce congrès qui a pu laisser planer l'impression de pagaille par moments (démarrage des ateliers) et un peu le manque d'accueil et de chaleur. Un apéritif officiel prévu n'a pas eu lieu. Le côté convivial a un peu été manqué.

Congrès de Fontaine 2011

Il aura lieu les 13, 14 et 15 mai 2011, organisé par Espéranto 38 en lien avec la fédération.

Les points forts seront : la projection du film espéranto, une conférence de Mireille Grosjean, une videoconférence avec la Chine. Ce congrès organisé, avec l'appui de la ville de Fontaine et du Conseil Général de l'Isère, se veut largement ouvert sur le public non espérantiste.

Relation avec Espéranto France

Mireille BESSET a régulièrement participé aux réunions d'Espéranto France à Paris. Par ailleurs Mireille assure un information sur les activités ou les questions qui se posent au niveau national, des membres du CA par le biais de la messagerie.

Formation

Trois stages ont été organisés conformément à l'engagement pris de la dernière assemblée générale.

- À Chambéry le 25 septembre 2010 : 25 participants. Un seul groupe animé par Claude Gerlat pour la partie théorique et la grammaire et Philippe Pellicier pour la partie conversation.

- À Saint-Egrève le 5 décembre 2010 : 10 participants. Un seul groupe animé par Philippe Pellicier et axé sur l'expression orale.

- À Chatillon sur Chalaronne le 3 avril 2011, en lien avec des groupes du Jura : une trentaine de participants. Groupes de niveaux animés par Régis Fabre, Pierre Thévenard et un animateur jurassien. Visite touristique de la ville guidée en espéranto.

Les stages sont en général bien perçus et appréciés des participants. Quelques personnes n'ont pas été satisfaites des parties trop théoriques et des exercices de compréhension auditives sur des émissions de radio en espéranto par exemple.

Préparation d'un timbre postal visant à la promotion de l'espéranto.

Ce timbre sera édité en 200 planches de 30 exemplaires. L'idée est de participer ainsi à la promotion de l'espéranto en choisissant un motif clair et facilement compréhensible ou qui éveille la curiosité de ceux qui le verront. La proposition finale a été choisie, discutée par une douzaine de personnes.

Préparation à l'éventuelle édition d'une malette de jeux

Cette idée est venue des jeux préparés par Rolande Cleizergues et utilisés par quelques-uns. Ce sont des jeux pédagogiques et éducatifs qui permettent de se perfectionner en espéranto et surtout de jouer en espéranto. Le projet ne peut se faire à moins de 500 exemplaires. Pour l'instant la liste des jeux a été établie et les contacts sont en cours avec de possibles éditeurs.

Compte tenu des sommes en jeu, l'édition ne pourra se faire que sur souscription s'il y a assez de souscripteurs.

Andrée Bertrand et Philippe Pellicier

3.2. Fakaj asocioj

3.2.1. Espéranto-Jeunes (JEFO)

Informado kaj komunikado

En 2010, ni eldonis 60 000 kalendaretojn por la jaro 2011. Kiel kutime, ni senpage sendis ilin al personoj kiuj bonvolas disdoni ilin kaj ni pagas ilin dank'al donacoj.

Instruado kaj ekzamenoj

Inter oktobro 2009 kaj septembro 2010, 606 personoj aliĝis al la interretaj kursoj de JEFO. Dum la sama periodo, 105 lernantoj finis sian kurson kaj ricevis diplomon kaj informojn pri JEFO kaj UFE por aliĝi al tiuj asocioj.

75 korektantoj helpis por plenumi la korektantajn taskojn.

Kulturo kaj aranĝoj

La komitatanoj partoprenas ĉiujn gravajn junularajn renkontiĝojn.

Festo 2010 okazis en Tuluzo kie 150-200 personoj partoprenis. Multaj koncertoj okazis dank'al la helpo de Flo Martorell.

Perspektivoj

FESTO 2012, 2013, 2014, 2015...

Pli da influo en la internacia junulara movado.

3.2.2. Groupe des enseignants espérantophones (GEE)

Mi devas konfesi ke mi estas tute ne efika. Mi skribis al Michel ke mi provos fari la taskon kaj pro diversaj zorgoj, mi ne sukcesis.

Mi scias nur pri eventoj en mia ĉirkaŭaĵo. Same kiel vi verŝajne, mi gvidas kursojn por infanoj kaj por plenkreskuloj en diversaj lokoj kaj klubo en mezlernejo. Ni organizis renkontojn kelkfoje kun aliaj asocioj, ekzpoziciojn en diversaj publikaj lokoj kaj en lernejoj diversnivelaĵ. Ni partoprenis kune kun aliaj asocioj en eventoj pri ne perforto, en forumoj de asocioj, en diversaj festoj, en libraj salonoj, ktp. Ĉiam, kiam ni havas la eblecon ni disdonas la flugfoliojn de GEE. La lokaj ĵurnaloj publikas regule artikolojn pri nia agado.

Dum la jaro 2010, niaj geamikoj Alice kaj Cédric kiuj ofte renkontis esperantistojn dum la vojaĝo kuŝbicikle dum 2 jaroj kaj duono reheimeniĝis. Nia amikino Nathalie preparis vojaĝon, surbaze de Esperanto, kun la 3 infanoj (5 ĝis 10 jaraĝaj) ; ili vojaĝis tra Brazilo dum 5 monatoj. Ili ĉiuj sukcese prelegis publike pri iliaj vojaĝoj klarigante la bonegan akceptadon de esperantistoj.

Maryvonne

3.2.3. Franca Katolika Esperanto-Asocio (FKEA)

(Jarraporto ne ricevita)

3.2.4. Fédération espérantiste du travail (FET)

(Jarraporto ne ricevita)

Financa raporto de Espéranto-France

2009-2010

Plej unue mi ŝatus pardonpeti, ĉar tre malfrue pretas tiuj dokumentoj. Mi antaŭvidis laboregon, sed finfine temis pri multe pli ol tio : mankis al mi kompleta « Granda Libro » de la antaŭaj kontjaroj, kaj ankaŭ nenia movo por 2009-2010 estis registrita en Ciel... Por plibonigi la librotenadon mi longe penis. Jen kial.

Pri librotenado : 20 741 movoj dum la kontjaro !

Kvankam ili okazis ĉefe ne dum la jarkonto 2009-2010, ĉi tie indas mencii tiujn grandajn ŝanĝojn pri librotenado kiuj okazis poste en 2010-2011, sed kiuj multe influis la laboron al ĉi tiu financa raporto pri 2009-2010.

Se vi ĉeestis nian Ĝeneralan Asembleon en Kaiserslautern, vi certe memoras la problemojn pri niaj kontoj : estis grandaj sumoj ne klaraj ; la kontokontrolanto denove ne aprobis la kontojn pro neklareco kaj neebleco serioze analizi la situacion. Laŭ li interalie estis tia problemoj, ĉar informoj estis disaj, ĉefe en programoj Ciel kaj Arthur.

Ĝuste por havi klaran situacion, mi decidis ŝanĝi tion. Post longega, malfacila sed sukcesa laborego, mi sukcesis plibonigi la programon Arthur por ke ĝi povu :

- ne nur utili por niaj kotizoj, donacoj, abonoj, butikaj aĉetoj kaj vendoj, sed ankaŭ por registri ĉiajn elspezojn kaj enspezojn niajn
- scii pri niaj konteltiroj bankaj, UEA-aj kaj FEL-aj, por ebligi seriozan kontrolon de registritaj pagoj
- dank'al diversaj iloj kiujn mi programis, enmeti en la programon Arthur multajn informojn : konteltiroj de 2007 ĝis nun, aŭtomata ĉiutaga elpreno de informoj el la banka retejo, monaj spezoj okazantaj en la sidejo, enmeto de la

kontaj saldoj el la financa raporto 2008-2009, kaj de la klientaj saldoj uzitaj en ĝi

- el ĉiuj datumoj de ĝi konata, produkti niajn oficialajn librotajn dokumentojn.

Malofte facilis atingi la necesajn informojn pri la pasinteco. Tamen mi dankas al Susanna kaj Aleks, pro ilia helpo ĉi-rilata.

Dank'al ĉi tiu laboro, la situacio estas multe pli simpla, klara, kontrolebla, fidinda. Kaj ĝisdata : anstataŭ 8-monata malfruo en librotado, nun la situacio estas ĝisdata, ĉar aŭtomata.

Konkrete, tio signifas ke en la rezulto 2009-2010, kiun vi malkovras nun, ne plu aperas nekomprebla « Paiements divers », kiel pasintjare.

Fidindeco de rezulto kaj bilanco

Gravas anonci signifan ŝanĝon en la maniero libroti : **la aferoj nun estas registrataj tuj post ricevo aŭ kreado de fakturoj**, anstataŭ dum la pagoj, kiel foje estis antaŭe (sed ne pri ĉio funkciiis tiel : dependis...). Tio faciligas librotadon, kaj nature donas pli klaran rezulton : tiel la ĉi-jara rezulto nur montras tio kio estis aĉetita aŭ vendita dum la jarkonto, sendepende de ĉu aferoj efektive estis pagitaj en ĉi tiu jarkonto aŭ dum alia. Do ĉi-jare ne aperos rimarkoj kiel tiu pasintjara, kiu ekzemple klarigis ke pro tio ke abonoj de antaŭaj jaroj estis pagitaj dum la studita jarkonto, la rimedoj estis pli altaj ol ili devus. **La ĉi-jara rezulto montras ĉiujn 2009-2010-aĵojn, kaj nur 2009-2010-aĵojn.**

Sed tiu ŝanĝo okazigas iujn problemojn traktendajn aparte, ekzemple pri aferoj fakturitaj dum antaŭaj jarkontoj, sed pagitaj poste. Tempo mankis por enprofundiĝi en tiuj malfacilaj neklarajoj de la pasinteco : kelkaj plu restos pritraktendaj en sekva jarkonto.

La ĉi-jara bilanco estis kreita surbaze de la pasintjara, konsiderante ĉiujn monajn movojn okazintaj dum 2009-2010 (ili estas precize konataj, kiel klarigite ĉi-supre). Sekve, ĉi-jara bilanco estas tiom ĝusta, kiom estis pasintjara.

Daŭraj problemoj

Dum **la inventaro** de la 30a de septembro 2010 montriĝis kaj estas daŭre multnombraj nekompreneblaĵoj : por multaj varoj en nia stoko estas mankantaj aŭ troaj en la realeco kompare kun la teorio. Tio devus signifi ke aĉetoj kaj vendoj ne ĉiuj estis entajpitaj ĝuste, tamen al mi ŝajnas ke la laboro estas farata sufiĉe serioze. Plu esplorde. Sekva epizodo : ĝi okazos la 30an de septembro 2011.

Ankaŭ pri **la mona kaso en la sidejo** estas problemoj. Ofte konstateblas aperoj kaj malaperoj de mono. Klare ne ĉio estas ĉiam notita ĝuste. Ekde marto 2011, ankaŭ tio estas registrata en Arthur. Tio verŝajne helpas batali kontraŭ tiaj eraroj.

Teamo

Apartajn dankojn al **Jean Lazert** (pretis helpi por retajpi informojn en Ciel, kvankam finfine ne estis necesa), al **William Dumoulin** (pri la arto libroti), al **Julia Hédoux** (pri amortizoj), al **Jean-Louis Pouillet** (libroservo, inventaro), al **Susanna Beglaryan** (pro ĉio, kaj eĉ pli), al **Guy Martin** (pri MIREGE, al **Jeanne-Marie Cash** (konsiloj), al **Ralph Schmeits** (UEA), al **la GEA-teamo** (pro pacienco pri Kaiserslautern), al **Aleks Kadar** (kasisto ĝis majo 2010, pro iuj el liaj respondoj), memkompreneble al **Arthur** (pro senferia laboremo), al **estraranoj** (pro la agrabla kunlaboro), kaj al **vi ĉiuj** (pro via pacienco).

Pri financoj

Ne tiom facilas, kiom oni pensas, taksii la valoron de la stoko. Teorie devus esti laŭ la vera aĉetprezo, tamen en pasintjara bilanco la 30an de septembro 2009 estis farite taksante la aĉetprezon surbaze de vendoprezo konsiderante 25%-an rabaton. Tamen **la granda stoko de Grand Dictionnaire Français-Espéranto**, kiun ni fizike havas ĉe FEL, estis valorigita laŭ multe pli malalta valoro : verŝajne temas pri la vera aĉeto-prezo. Mi ne scias pli. Sed mi rimarkis, ke por tiuj *Grand Dictionnaire Français-Espéranto*, kiujn ni havis ne ĉe FEL sed en la sidejo, laŭ la kutima valortaksado estis valortaksitaj. Tio ŝajnas al mi strange. Por plifidindigi la ĉi-jaran rezulton, **mi do korektis tiun eraron aperigante en la bilanco debeton de 5435,85 € en la pasivo**, kiu fakte devus esti aperinta en la pasintjara rimedo « variado de la stoko ». Se tiel estus, la tiama defcito ne estus 27728,50 €, sed 33164,35 € ! Tamen mi decidis ne aperigi ĝin en la ĉi-jara rezulto, ĉar ne temas pri vera rimedo kiun ni elspezis en 2009-2010, sed nur pri eraro okazinta en bilanco 2008-2009.

Vi verŝajne rimarkis ke ŝanĝiĝis nia banko : ni ne plu havas monon ĉe *La Banque Postale*, sed en banko *Crédit Coopératif*. Ĝi estas ligata al etika ŝparinstanco NEF al kiu ni donis 90 € por akiri tri sociajn akciojn.

Mi ne bone komprenis, kial donacoj al Klubo 2000 aperas kiel rezervo en la pasivo. Dum la pasintaj jaroj, ili teorie devus esti elspezita dum la jaro por specifa agado. Kvankam ŝajnas ke ne ĉiam facilas detale taksii la ekzaktan realan koston de la agado, almenaŭ la facile mezurebla enspezo devus klare aperi en la rezulto. Ne estis tiel pasintjare : aperis 0 en la produktoj, kvankam ja estis donacoj je 3100 € (mi aldonis la informon inter krampoj), sed la mono rekte irus al la rezervo (kune kun tiuj de la antaŭa jaro !). Do estas ioma nereguleco en la maniero trakti tion. Plu pripensindas. Ĉi-jare mi faris kiel la antaŭlastan jaron : mi klare montris la produkton, do **2950 € aperas en la rezulto kiel produkto Klubo 2000**. Endos decidi ĉu ilin poste meti en la konton *Report à nouveau*, aŭ (plej verŝajne) al la rezervo.

Pri MIREGE, kvankam pasintjara rezulto montris subvencion je 6331,71 €, mi nenian subvencion tian sukcesis trovi en niaj kontoj, sed subvencion je 18986,40 €. Tiam mi komprenis ke la kasisto volis montri ke ĉiuj MIREGE-elspezoj konsideritaj por 2008-2009 ja estis kovritaj de subvencio. Kaj tial restis 12654,69 € kiel kredito por MIREGE en la pasivo. En la rezulto 2009-2010 mi montris ĉiujn enspezojn kaj elspezojn de MIREGE, kiuj ne estis montritaj en 2008-2009. Tamen 500 € restos por pagi en jarkonto 2010-2011, tial restas 500 € kiel kredito por MIREGE en la pasivo. Resume, **MIREGE estas preskaŭ ekvilibra : ekzakte deficitita je 64,94 €, sed ĝi helpis al eldono de Le Monde de l'Espéranto je 1000 €**.

Unu nova dumviva membro estis. La enspezo de 1375 € ne aperas kiel produkto en la rezulto, sed en la pasivo ĉe rezervo *Membres à vie*.

Eble aldonindus rimedo je ĝis 1594,95 € : temas pri mono debetita de UEA el nia konto pri la UK, sed kiun mi ne sukcesis kompari kun kalkulita ŝuldo. Plu esploras petante detalojn al UEA, sed tempo mankis ĝis nun.

Dum 2009-2010 ni eldonis la libron **La Eta Princo**. Ĉiuj elspezoj aperas en la rimedoj, sed parton de ili pagu Kanada Esperanto Asocio : tial aperas specifa produkto. Iom ni vendis, sed la plej granda parto aperas en la produkto **Variation du stock**, taksita laŭ reala kosto.

Kiel klarigi la altan ĉi-jaran profiton ? Eble la nova maniero librotendi laŭ fakturoj kaj ne laŭ pagoj (legu supre) helpas al neapero en la rezulto de elspezoj, kiuj koncernas antaŭajn jarkontojn : la montritaj enspezoj kaj elspezoj estas nur tiuj de la kontjaro 2009-2010. Sed notindas rimarkinda profito de la sukcesa **kongreso en Kaiserslautern** komuna kun GEA, de la sukceso de **la karavano al la UK en Havano**. Verŝajne ankaŭ helpas al profito la bedaŭrinda fakto, ke **Le Monde de l'Espéranto** aperis ne sufiĉe : ĝi kostis malpli.

Ankaŭ rimarkindas **altegaj donacoj** ! Bonkoraj donacintoj estu plej elkore dankataj.

Laŭ informoj kiujn mi ricevis, inter ili estis « specialaj » celitaj donacoj : 3 300 € por « états généraux » kaj 1 830 € por « presado de paĝmarkiloj ». Por detaloj, bonvolu plezure rilati kun la tiama kasisto A. Kadar, dankon.

Eble vi rimarkos kreskon de kaj « Créances sur usagers » kaj « Usagers créditeurs ». Temas pri ambaŭflankaj ŝuldoj, kiujn mi nur rapide trarigardis, sed kiuj al mi aspektas normalaj. Temas ekzemple pri antaŭpago de 3761,25 € por interasocia kongreso en Sète : la produkto kaj rimedo aperos en la sekva bilanco. Ankaŭ estas ambaŭflankaj ŝuldoj el kaj al Espéranto-Jeunes, kiuj estas kalkulitaj sed ne jam pagitaj. Aliaj tiaj ekzemploj listigeblas.

Viaj rimarkoj kaj demandoj estos tre bonvenaj dum la Ĝenerala Asembleo. Se vi antaŭe informas al mi pri ili ĉe sebastien.montagne@esperanto-france.org, eble mi povos antaŭe ĝin studi kaj iom pli precize respondi.

Sébastien Montagne, kasisto (de junio 2010 ĝis aprilo 2011)